

Kontaktoj kun srilankanoj laŭ Stefano KELLER (3)

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 124-2-784, 1984

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-124/Radiokasedo-124-2-784-Claude-GACOND-Kontaktoj-kun-srilankanoj-lau-Stefano-KELLER.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni petas al Stefano Keller, la esperanto-instruisto de Kultura Centro Esperantista, kiu estis en Srilanko, kiajn homajn kontaktojn li havis en tiu ĉi lando, kie li laboris ankaŭ por esperanto. Sed unue, Stefano Keller, per kiuj lingvoj vi rilatis ? Ĉu nur per esperanto ?

SK.- Esperantistojn mi kontaktis nur per esperanto kaj la aliajn homojn en la angla. Sed mi devas diri al vi, ke multaj homoj ne bone parolas la anglan kaj eĉ, aliaj homoj, ne parolas la anglan.

Cl.- Kaj nun, se mi ne eraras, en la sudo de Srilanko oni ĉefe estas budhisma. Ĉu vi estis en tiu budhisma regiono ?

SK.- Jes, mi ekskursis al Batapola. Tie mi vizitis familion. Estis sinhala, budhista familio, kiun mi kontaktadis jam antaŭe per leteroj. D-ro Hariŝĉandra Kaviratna, la invitinto estas fama sciencisto, verkisto kaj lingvisto. Li estas praktikanta naturkuracisto. Foje li estis aktiva propagandisto de esperanto - tio okazis antaŭ la dua mondmilito, kaj nun maljuna, li denove volas kontribui al la disvastigo de la internacia lingvo. Li estas konvinkita kosmopolito. Verŝajne li estis nur simpatianto, apoganto de la ideo de la internacia lingvo, ĉar hodiaŭ li ne plu parolas esperanton. Mi instruis elementajn frazojn al la familio. Ĝenerale srilankanoj estas tre gastamaj, naturaj, sinceraj homoj. Mi ĝuis la bongustajn manĝaĵojn, kiuj estis centprocente vegetaranaj. Kaj mi admiris la plej diversajn legomojn, fruktojn kaj plantojn en la ĝardeno, kiujn mi neniam vidis antaŭe. Mi aŭdis pri ili nur kiel pri ekzotikaĵoj. Posttagmeze kun la familio ni vizitis budhistan templon. Ni elŝuiĝis, kompreneble, sub la arbo de luminiĝo kaj aliris la sanktejon. Mi povis foti ĉion, kio ne estas kutima afero por turistoj, kaj ricevis detalan priskribon pri la signifo de la statuaj scenoj, ĉar mia gastiganto estas fame konata persono, eĉ la prapatroj liaj aktivis kiel budhistaj monaĥoj en la vizitata templo. Estis du monaĥoj, kiuj gvidis nin. La juna, kiu estis nur 23-jara, invitis min vidi lian ĉambron. En la ĉambreto sur ŝranko vicis okcidenteŭropaj sapoj, stereoradio, budhistaj bildoj, kaj kion vi pensas, kio pendis ankoraŭ sur la muro... ?

Cl.- Eble... nudaj virinoj ?

SK.- Ekzakte ! Estis Playboy kalendaro. Ĉio ĉi estas donacita de la vilaĝanoj kaj de la vizitantoj.

Cl.- Do, modernaj junaj homoj ankaŭ en Azio, ĉu ne ?

SK.- Jes, ili akceptas ĉion, kion oni donacas al ili. Mi ekinstruis esperanton al li, kaj venontan matenon li venis kun alia monaĥo al la hejmo de miaj gastigantoj kaj ni daŭrigis la esperanto-lecionon.

Cl.- Kaj en la pasintaj du semajnoj vi raportis pri la esperanto-instruado, kiun vi faris en Srilanko. Do, ĉu vi havis kontakton kun aliaj esperantistoj en tiu vojaĝo ?

SK.- Jes. Iun dimanĉan matenon okazis laborkunsido kun la hodiaŭaj aktivuloj de la iama grupo. Ni estis denove en la kuracejo de d-ro Dharmatilake en Kolombo. Do, ĉeestis f-ino Kasturjaraĉĉi, kiu lernis esperanton antaŭ kvin jaroj de d-ro Dharmatilake, s-ro Ronald Peries,

s-ro Jesudasan, unu juna interesiĝanto kaj mi mem. Niaj temoj estis : la ĝenerala situacio de esperanto en Srilanko, konkretaj paŝoj dum la venontaj tagoj, ni devis ja agi. S-ro Peries diris, la Fondaĵo Azio-Afriko de UEA devus helpi ilin sub la gvidado de s-ino Kikusima el Japanio. Kaj ankaŭ s-ro Jesudasan aldonis, ke ili ne helpas multe. Ili foje petis propagandan materialon kaj ricevis nur unu ekzempleron de libro. Do, mi insistis parolante pri loka agado, ke ni devas enkoduki, prezenti esperanton al la publika biblioteko en Kolombo kaj prelegi en universitatoj. Sed d-ro Dharmatilake dubis pri tio, ke ni sukcesos fari tion.

Cl.- Vi bonvolu eble rakonti pri kontakto kun iu el la popolo, iuj tre simplaj homoj, eble malriĉuloj, kiujn vi renkontis.

SK.- Jes. Do, post la unua semajno mi pensis nun alvenis la tempo komenci la sunbanadon, kion mi volis enkoduki nur laŭgrade. Kompreneble oni ne faras tion vespere, kiam estas mallume kaj danĝere. La pordisto de la marborda hotelo atentigis min pri tio, kiam mi volis aliri la plaĝon, nur por vidi, kiel ĝi estas instalita, kia estas la elvido. Li diris al mi : « Vi iru nur maldekstren, kie la lampoj de la hotelo lumigas la ĉirkaŭaĵon. Neniel vi iru dekstren. Tie estas la fiŝistoj, estas mallume... » kaj poste li montris al mia poŝlampo, al mia brakhorloĝo kaj li daŭrigis « ...ili prenos tiujn, kaj... » li ne diris, nur montris, ke ili eble tranĉos mian kolon por la valoraĵoj. Do, tio estis vespere, sed la venontan matenon mi aliris la plaĝon ĉe sunlumo kaj mi iris al la dekstra flanko.

Cl.- La flanko de la malriĉuloj, ĉu ne ?

SK.- Jes, jes. Estas la fiŝistoj. Ili loĝas en malgrandaj kabanoj ĉe la oceanbordo, ĉirkaŭ kiuj putriĝas rubaĵamasoj. Ne estas necesejoj en la dometoj, do ĉiuj solvas siajn problemojn ekstere. Kaj mi profitis de la lastaj minutoj antaŭ la foriro al la rendevuo en la biblioteko, dume mi konversaciis kun filino de fiŝisto. Kaj ŝi diris al mi « venu al nia flanko, ĉar la policistoj katenos min, se mi aŭdacos promeni je la turista flanko. » kaj ŝi poste insistis, ke mi iru kaj trinku teon en ilia domo. Sed ĉar mi ne povis iri tien, ĉar ne plu estis sufiĉe da tempo, ŝi reagis tiel : « Jes, vi ne volas [trinki teon ĉe malriĉuloj](#)... ». Do, estas vere fakto, ke ili ricevas de la registaro nur minimuman porcion da rizo, sed por banano ekzemple, la mono ne sufiĉas. La fileto sur la brakoj de ŝia fratino, kiu staris apud ŝi, fulmrapide elkaptis la proponitan bananon el mia mano.

Cl.- Ĉu vi bedaŭris, ke vi ne povis esti ĉe ili ? Ĉu nun, se vi reiras, vi provus havi tiun kontakton, aŭ ne?

SK.- Tute certe mi irus en ilian domon kaj vizitus ilin tie.

Cl.- Nun vi forlasis la insulon Srilanko kaj ankaŭ la kurson, kiun vi komencis. Estas interese scii, ĉu la afero pludaŭras.

SK.- Jes, s-ro Jesudasan, kiu estas emerita lingvo-instruisto kompetente helpas tiujn komencantojn, laŭ ebloj de la disponataj instruiloj. Ankaŭ gesinjoroj Dharmatilake, Kasturjaraĉĉi kaj Peries partoprenas en la esperantigo de la novuloj, kies nombro estas proksimume 35.

Cl.- Kaj ĉu tiu kurso okazas ĉiam en la biblioteko ?

SK.- Jes, ni havis tre bonan kontakton kun la estraro kaj kunlaborantoj de la biblioteko, kaj dum mia ĉeesto tie mi demandis ilin pri tio, ĉu eblus daŭrigi la kurson en la sama loko kaj ili tre volonte akceptis.

Clo.- Kaj, ĉu partoprenas bibliotekistoj ?

SK.- Jes, estis eĉ tri personoj, kiuj regule venis al la kursoj.

Cl.- Do, tio estas tre grave kaj mi opinias, ke eŭropanoj povus helpi kaj ke eble unu el la helpoj estus sendi ion en esperanto al tiu ĉi biblioteko. Ĉu vi povus diri la nomon aŭ la lokon de tiu ĉi biblioteko ?

SK.- Jes, tre bone efikus eĉ simpla poŝtkarto aŭ letero, eble troaj esperantaĵoj, ellegitaj gazetoj kaj libroj same estus bonvenaj. Kaj la adreso estas : Esperanto-Grupo Srilanka, s-ro D.B. Jesudasan, poste restante, 71, Pagoda Para, Nugegoda, Srilanko.

Cl.- Kaj se vi ne povis noti ĉion tion, simple skribu al Svisa Radio Internacia kaj ni transsendos al vi tiun ĉi adreson, ĉu ne ? Kaj nun, eble pri viaj kontaktoj. Vi estas en Svislando, ĉu de Svislando vi agas, vi rilatas kun tiuj ĉi novaj esperantistoj ?

SK.- Kvankam korpe mi estas en Svislando, sed pense mi restis en Srilanko kaj ankaŭ mi multe skribas al ili. Mi skribis unuope al ĉiuj miaj lernantoj tie, do imagu, ĉirkaŭ tridek-kvin poŝtkartojn...

Cl.- Kaj vi ricevis jam respondon en esperanto, ĉu ?

SK.- Jes, mi jam ricevis du respondojn en esperanto kaj du aliajn, kiuj skribas angle sed same promesas, ke venontfoje skribos en esperanto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond informiĝis pere de Stefano Keller, la esperanto-instruisto de Kultura Centro Esperantista pri agado okazinta en Srilanko koncerne la instruadon de esperanto. Ĝis reaŭdo!